

Intervjuo kun Claude Piron (5),
pri la arto traduki kantojn en esperanton;
la konsisto de la esperanto-radikaro helpas al tradukistoj.

Radioprelego de Claude GACOND, SRI, 731/108, 1977 oktobro 12, 14 kaj 15.

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-1977-14/SRI-1977-14-B-6-108-Claude-Gacond-Intervjuo-kun-la-verkisto-kaj-poeto-Claude-Piron-5-Tradukado-de-kantoj-en-Esperanton.mp3>

CL.- Parolas Claude Gacond. Ni aŭdigas al vi hodiaŭ la kvinan parton de intervjuo, kiun ni realigis kun la verkisto kaj poeto, Claude Piron, pri la temo: tradukado de kantoj en esperanton. La pasintan semajnon Claude Piron donis ekzemplojn pri la kapablo, kiun esperanto havas traduke tre fideli la originalaĵon. Ni reaŭdigas al vi tiurilate interesan ekzemplon. Estas Claude Piron, kiu kantas :

(CP kantas)

CP.- Kiel vi rimarkas, la ritmo estas absolute ne ŝanĝita kaj kie la germana teksto diras ‘Soldaten’ kaj ‘Spaten’, ni en esperanto havas kun simila akcento ‘soldatoj’ kaj ŝpatoj’.

CL.- Jes, sed tio estas tutcerte feliĉa hazardo pro etimologiaj samecoj.

CP.- Ne, tute ne. Unuavide jes, sed fakte ne. Ni ne forgesu, ke hazardaj okazaĵoj tamen sekvas la statistikajn leĝojn pri probableco. Ekzemple en la franca, la hispana, en la angla, en la ĉina, en la japana, en la polinezia vi tutsimple ne povus havi tiun feliĉan hazardon, ĉar tiuj lingvoj inkluzivas neniun vorton komenciĝantan per ‘ŝt’, tiuj du konsonantoj. Sed eĉ se ĝi ekzistus, ankaŭ estus necese povi ĝin meti sur la ĝustan lokon kun la ĝusta akcento. Kaj tiurilate vi bezonas gramatikon, kiel la esperanta. Kaj aliflanke, se temus pri simpla hazarda okazaĵo, kaj ne pri la vortkonsisto de la lingvo, tia fenomeno estus unika aŭ almenaŭ ekstreme malofte, sed tute ne. Esperanto-tradukanto konstante trovas similaĵojn. Kaj kiam tia koincido dekfoje ripetiĝas, ni troviĝas antaŭ tielnomata multobligita probableco, kaj kiam oni ne plu povas citi puran ŝancon, sed nur lingvan leĝon.

CL.- Sinjoro Claude Piron, ĉu vi povus doni ekzemplojn en diversaj lingvoj, kiuj demonstras tion ?

CP.- Kompreneble. Ankaŭ estas hazardo ke la konata titolo el la angla, ‘The last rose of summer’ tradukiĝas esperanten per ‘La lasta rozo de somero’. Aŭ ke la latina frazo: ‘Panem nostrum quotidianum danobis hodie’ en esperanto fariĝas la samritma kaj similsona: ‘Panon nian ĉiutagan donu al ni hodiaŭ’. Aŭ ke la hispana, por la hispana eble mi povus preni ekzemplon en kanto:

(CP kantas hispane)

... esperante fariĝas :

(CP kantas esperante)

Kun tre simila tono kaj sono, ĉu ne ?

Aŭ pri la rusa :

(CP kantas ruse)

...esperante tradukiĝas per :

(CP kantas esperante)

Mi ne scias, ĉu per tiaj tre mallongaj ekstraktoj vi povas juĝi la kvaliton de la lingvo aŭ la similecon de la koncernaj lingvoj, sed vere estas eksterordinara sperto por kantotradukisto konstati tiun similecon. Fakte ne estas hazardo, temas simple pri la konsisto de la esperanto-radikaro.

Cl.- Ĝis nun vi donis ekzemplojn el hindeŭropaj lingvoj. Ĉu el ne-hindeŭropa lingvo vi ankaŭ posedas similan ekzemplon?

CP.- Mi posedas similajn ekzemplojn, sed bedaŭrinde ili estas ĝenerale tre malfacile kanteblaj, ĉar la melodioj estas tute aliaj ol tiuj el kiuj ni kutimiĝas. Sed tamen por iom fini la demonstron, mi ĉerpos ekzemplon el la israela folkloro. Jen refreno de israela lulkanto, en la originalo hebrea :

(CP kantas hebree)

Kaj jen nun la traduko, tute laŭvorta, cetere, kiel rekonas certe niaj israelaj aŭskultantoj:

(CP kantas esperante)

Kiel vi sendube rimarkis, mi pensas, ke la tre speciala ripoza paciga etoso de tiu kanto ŝuldiĝas grandparte al la 'u'-sono. En la hebrea tiu 'nun', '...', aŭ '...' havas specialan atmosferon. Kaj en esperanto, sen iu ajn malfacilaĵo ni sukcesis redoni tion dank' al la ebleco uzi la vorton 'nun' kaj ankaŭ la vorton 'sun', kiu rimas kun ĝi kaj respektas sen ia aldono de muziknoto tute laŭvorte la sencon de la originalo. Kaj ni povas diri ke tiu lulkanto estas efika, ĉar mi konas malgrandan infaneton denaske esperantistan, kiu ofte petis la patron kanti ĉi tiun lulkanton, kiam li estis laca kaj antaŭ la fino de la kanto la infano efektive dormis.

Cl.- La venontan semajnon ni aŭdigos al vi la sekvon de tiu ĉi tre interesa intervjuo pri la tradukado de kantoj en esperanto, kiun ni realigis kun la poeto Claude Piron. Vi aŭdis el Svislando Claude Gacond kaj Claude Piron. Ĝis reaŭdo!